# Eveline van der Veer kaj Marita Kruijswijk : Frisaj vestaĵo

## La frisa virina kostumo




Dum la 18-a jarcento la frisaj virinoj adaptis sian vestaĵon al la tiutempa modo. Tiu modo plejparte originis el Parizo; sekve oni trovas altan talion, kaj ankaŭ la formo de la manikoj kaj longo de la jupo estas karakterizaj. La tipe frisa kostumo, ankoraŭ hodiaŭ montrata je multaj diversaj okazoj, baziĝas sur la vestaĵo kiu estis laŭmoda ĉirkaŭ la jaro 1860. Ĉi tiu kostumo konsistas al pluraj partoj. La subveston formas blanka katuna subpantolono, kiu etendiĝas ĝis sub la genuoj, kaj blanka subjupo. Ambaŭ elementoj estas borderitaj per punto kaj havas rubandetojn por fiksi ilin en la talio. Super ĉi tiuj subvestoj la virinoj portas jakon, kiu atingas sub la koksoj, kun manikoj diversstilaj laŭ la regiono. Krome la virinoj surhavas antaŭtukon ĉirkaŭ la talio, pintotukon sur la ŝultroj, blankajn ĝisgenuajn ŝtrumpojn el katuno, kaj nigrajn ledoŝuojn kun arĝenta buko.

Ĉi-sube vidu foton de ĉirkaŭ la jaro 1908, kiu montras virinon en frisa tradicia kostumo.

Ekzistas multaj similaĵoj inter la tradiciaj kostumoj de la provincoj Frislando, Groningen kaj Drenthe. En Groningen la ĉiutaga uzado de la kostumo malaperis jam de longe (fine de la 19-a jarcento). En Frislando kaj Drenthe tio okazis nur post la dua mondmilito.

Speciala trajto de la frisa kostumo estas la kapkovraĵo. En la 17-a jarcento oni uzadis mallarĝan metalan krampon por fiksi simplan kufon sur la kapon. Poste la metala bendo iom post iom fariĝis pli larĝa kaj estis uzata kiel ornam-objekto: feron anstataŭis arĝento, kupro, orumita latuno aŭ oro, depende de la riĉeco de la familio. Meze de la 19-a jarcento oni komencis uzi pli grandajn orelkovraĵojn, kaj ĉirkaŭ 1870 ĉi tiuj objektoj aspektis kvazaŭ kaskoj, kovrantaj preskaŭ la tutan kapon. Oni produktis la orelkovraĵojn el diversaj materialoj – oro, arĝento aŭ kupro – laŭ la buĝeto de la portantino. Estis ankaŭ frisaj bienulinoj malpli bonhavaj kiuj portis duonan orelkovraĵon, parte el oro.

La kapon ornamas ankaŭ la kufopingloj kaj la surfrunta pinglo. La kufopingloj longas ĉirkaŭ 10 centimetrojn kaj ofte havas riĉe ornamitan finaĵon. La surfrunta pinglo estas impona ornamaĵo, ofte inkrustita per diamantoj. Oni portas ĝin dekstre aŭ maldekstre sur la frunto. En la frisa urbo Hindeloopen la senedzaj virinoj portis la surfruntan pinglon dekstre, la edzinoj portis ĝin maldekstre.



Instali la kapkovraĵon estas granda laboro. Unue oni forigas la harojn el la vizaĝo helpe de tiel nomata kepra bendo. Al junulinoj kiuj unuafoje ekportos la kapkovraĵon, oni kutimis fortondi la harojn. En la Frisa Muzeo, en Leeuwarden, troviĝas belega bildo el 1857 pri ĝuste tia okazaĵo, de la pentristo P.W. Sebes: patrino staras kun tondilo enmane apud sia filino, kiun dume konsolas pli aĝa fratino. Sur la kepra bendo metiĝas blanka kufo, la pinta kufo. Ĉi tiu kufo havas trikitan aŭ kroĉetitan strion en la nuko. Ĝin kovras la nigra kufo, el katuno, kies glata flanko kuŝas strikte sur la frunto. Sekvas la metala kovrilo, inter kies metalaj duonoj nur la nigra kufeto estu videbla. Dumsemajne junulino povis eliri tiel vestite, ekzemple por butikumi. Dimanĉe oni aldonis, kiel lastan elementon, la tiel nomatan flirtan kufon. La flirta kufo havas fadenon fronte, per kiu oni ligas ĝin al ornamaĵoj de la kapkovraĵo. Per kufopingloj oni ligas la kovrilon al la blanka kufo kaj la kepra bendo.

Ĉirkaŭ la jaro 1850, pli malpli 85% el la kamparaninoj, kaj 65% el la urbaninoj, portis dimanĉe la orelkovraĵon. Tridek jarojn poste la orelkovraĵo jam perdis grandparte sian popularecon, kaj uzis ĝin nur 45% el la urbaninoj. En 1856 pastoro Bange verkis poemeton per kiu li kvazaŭ deklaris militon al la orelkovraĵoj:



*Formetu la ĉevalan kapbridilon*
*Ornamu vin per la naturaj dotoj*
*Kredu, bukletoj ĉirkaŭ la kapo*
*Pligrandigas por ĉiu virino kaj karulino*
*Senfine ŝian gracion!*

Pri la ceteraj ornamaĵoj ni scias relative multe, ĉar konserviĝis la inventaroj faritaj okaze de juraj proceduroj. Ekzemple, la frisan kostumon ofte akompanis flanka arĝentaĵo (*sydsulver* en la frisa lingvo). Ĝi konsistas el arĝenta tondilo fiksita al ĉeno, kun hoko, pinglujo kaj kudrilujo. Ĝenerale, inventaroj kiuj datiĝas post 1820, malpli ofte mencias flankan arĝentaĵon. Same estas pri la anso-sakoj kun hoko. Junulinoj kutime ne portis ĉiujn eblajn ornamaĵojn; necesis perlabori ilin. Tamen, kiam filino de riĉa bienulo atingis la edziniĝan aĝon, ŝi paradis per ĉiuj siaj ornamaĵoj inkluzive la orelkovraĵon. La anso-saketo kun bidoj estas tre malnova kaj ankaŭ tipe frisa. La bidoj estas el vitro, diafanaj aŭ opake blankaj, laktkoloraj kaj helbluaj. La randoj de la sakoj estas borderitaj per bantoj el bidoj.

## Frisa vira kostumo

La viroj aspektis multe pli modeste ol iliaj bele vestitaj edzinoj. La viran kostumon karakterizas bela fasono. Ĉirkaŭ la jaro 1815, la viraj kostumoj iĝis pli sobraj kaj malhelkoloraj, reage al la napoleonaj militoj. Paradi per buntaj vestoj estis tiutempe privilegio de filoj el riĉaj familioj. La vira kostumo el la imperio de 1800-1815 formas la bazon por la tradiciaj vestaĵoj de la postaj 150 jaroj. Ĝi konsistas el tola ĉemizo kun brodita kolumo kaj manumoj kiujn oni fermas per arĝentaj butonoj. Super la ĉemizo metiĝas kolora veŝto kun arĝentaj butonoj, foje sesangulaj kun gravurita bildo de ĉevalrajdisto. Post 1840 la veŝtoj havis malpli okulfrapajn kolorojn kaj tiuperiode oni produktis ilin el prilaborita ŝtofo. Super la veŝto troviĝas jako el katuna damasko, kun butonoj jen el la sama ŝtofo, jen el osto, stano aŭ arĝento. Ĉirkaŭ la kolo oni portis loze ligitan katunan aŭ silkan koltukon, kiujn oni bantigis aŭ nodis en multaj diversaj manieroj. Krome la viroj portis tiel nomatan klapan pantalonon. Ĝi estas el nigra veluro kaj havas fronte klapon kun butonoj. La pantalono atingas ĝis sub la genuoj, kie ĝi fermiĝas per arĝenta buko. La krurojn kovras bluaj, trikitaj ĝisgenuaj ŝtrumpoj el lano.

La ŝuoj estas nigraj kaj havas arĝentan bukon pli grandan ol sur inaj ŝuoj. La nigra cilindra ĉapelo laŭ Biedermeier-stilo estis universala ĝis 1870. Ankaŭ ĝi havas arĝentan bukon. En la rando de la pantalono troviĝas poŝo, en kiu la viroj ĝenerale tenis arĝentan poŝhorloĝon al kiuj du sigeliloj kaj horloĝostreĉilo estis ligitaj per arĝentaj ĉenoj. Ofte la viro kunhavis ankaŭ tabakujon kaj pipon.







La tekston tradukis el la nederlanda al Esperanto: Arjen-Sjoerd de Vries